

MODELTESTO DE LA EKZAMENO
UEA-KER C2
AŬSKULTA KOMPRENADO
TASKOFOLIOJ

Unua parto

Vi aŭdos sondosieron. Ĝi konsistas el 5 eroj.

La tasko estas decidi ĉu en la sonmaterialo aŭdeblis (JES) aŭ ne (NE) la asertoj grupigitaj laŭ la kvin eroj.

Aŭskultu la sondosieron unufoje.

Dum la aŭskultado vi povas jam labori. Post la sondosiero vi havos ankoraŭ 3 minutojn por fini viajn solvojn.

Unue vi havas du minutojn por legi la demandojn, al kiuj vi devos trovi la respondon.

Akireblaj poentoj: 10

1-a parolanto	
1. La angla lingvo estis uzata dum seminario pri klimatsanĝiĝo, organizita de TEJO.	Jes/Ne
2. Uzi Esperanton en internacia seminario, kie partoprenos ankaŭ ne esperantistoj, estus ekskluziva afero.	Jes/Ne
2-a parolanto	
3. Laŭ la observo tiuj, kies gepatra lingvo ne similas al la angla, havas malavantaĝojn paroli la anglan kompare al tiuj, kies gepatra lingvo similas al la angla.	Jes/Ne
4. Esperanto estas lingvo de inkluziveco, kio observeblis dum junulara renkontiĝo, kie la multnacia partoprenantaro samnivele parolis en unu komuna lingvo.	Jes/Ne
3-a parolanto	
5. En Filipinoj pro la deviga instruado de la angla en lernejoj, la lokaj lingvoj ne povas evolui sekve ili ne havas terminojn por la novaj teknologiaj konceptoj.	Jes/Ne
6. Oni ĉiam povas trovi taglish /tagliŝ/ meze de la tagala-frazoj de retaj komunikaĵoj.	Jes/Ne
7. Li alvokas al lukto por kompleta malpermeso de la uzo de la angla en la institucioj cele ebligi la evoluon de la lokaj lingvoj kaj kulturoj.	Jes/Ne
4-a parolanto	
8. La denaska lingvo de multaj en Singapuro estas singlish /singliš/, miksaĵo de la angla kaj ĉina lingvoj.	Jes/Ne
9. La enkonduko de Esperanto en la singapuraj lernejoj plirapidigus la lernadon de la malaja lingvo, kiu estas la nacia lingvo de la lando.	Jes/Ne
5-a parolanto	
10. La parolinto atakas TEJO-n pro foruzo de sia energio por organizado de anglalingva seminario.	Jes/Ne

MODELTESTO DE LA EKZAMENO
UEA-KER C2
AŬSKULTA KOMPRENADO
TASKOFOLIOJ

Dua parto

Aŭskultu la intervjuon, kiun faris *Eva Fitzelová* kaj *Johannes Mueller* kun kelkaj personoj, kiuj partoprenis la naskon de Muzaiko. Surbaze de la aŭdita teksto plenigu la suban tabelon markante la kadrojn kie aserto rilatas al la koncerna(j) persono(j).

Vi ricevos unu poenton por ĉiu horizontala linio, kie vi trovis ĉiujn respondojn.

Aŭskultu la sondosieron dufoje.

Dum la aŭskultado vi povas jam labori. Inter kaj post la aŭskultoj vi havos ankoraŭ po 3 minutojn por fini kaj kontroli viajn solvojn.

Unue vi havas unu minuton por legi la informojn, kiujn vi devos atenti.

Akireblaj poentoj: 14

	Eva	Johannes	Matt [Mac]	Niel [Nil]	Roĉjo	Sasha [Saŝa]	Tomas	nomo ne- menci ita
<i>Ekzemplo: Gvidis la intervjuon</i>	x	x						
1. Anstataŭis aliajn:								
2. Ĉeestis la Britan Kongreson en 2010:								
3. Donacis monon:								
4. Estis programisto:								
5. Konstruis la hejmpaĝon:								
6. Kompilis programerojn:								
7. Kreis uzkonsilojn por la kunlaborntoj:								
8. Laboris pri laŭleĝa funkciado:								
9. Legis la novaĵojn:								
10. Malcertis pri sia lingvokono:								
11. Okupiĝis pri sociaj medioj:								
12. Ne alparolis la konversacion:								
13. Dezajnis la T-ĉemizojn:								
14. Rolis en la ĵinglo:								

MODELTESTO DE LA EKZAMENO
UEA-KER C2
AŬSKULTA KOMPRENADO
TASKOFOLIOJ

Tria parto

En tiu ĉi parto de la ekzameno vi aŭdos unu prelegon kaj havos du rilatajn taskojn.

La unua tasko estas argumente pravigi aŭ kontraŭi asertojn en (minimume 2) kompleksaj frazoj laŭ la aŭdita teksto.

La dua tasko estas verki 100-120-vortan enhav-resumon por la memorlibro, kiu arigos specimenojn de la prelegoj prezentitaj dum la SAT-Kongresoj en la 10 pasintaj jaroj. Via resumo estu objektiva, fidela al la aŭdita raporto, sekvu la logikon de la aŭditaĵo kaj prezentu la ĉefideojn kaj ideo-rilatojn de la prelego.

Aŭskultu la sondosieron unufoje.

Dum la aŭskultado vi rajtos fari notojn. Post la aŭdo de la sondosiero vi havos 25 minutojn da labortempo.

Akireblaj poentoj: 16

Tasko 1

Legu la subajn asertojn, kiuj koncernas la aŭditan tekston. Via tasko estas **pravigi** aŭ **kontraŭi** ilin skribante kompleksajn **frazojn** kun argumentoj, kiuj baziĝas sur la prelego.
(Atenton, **NE** komentu, **NE** aldonu propran opinion.)

1. La raporto prezentas anarkiistan vidpunkton.
2. Laŭ la aŭtorino la ŝtato devas protekti la virinojn.
3. Virinoj fariĝas pli kaj pli solecaj.
4. La stilo de la raporto malkongruas kun la prezentitaj tezoj.

Tasko 2

Verku **100-120-vortan enhav-resumon** por la memorlibro, kiu arigos specimenojn de la prelegoj prezentitaj dum la SAT-Kongresoj en la 10 pasintaj jaroj.

Via resumo estu **objektiva, fidela** al la aŭdita raporto, sekvu la **logikon** de la aŭditaĵo kaj prezentu la **ĉefideojn** kaj **ideo-rilatojn** de la prelego.